

Sciencfikcio kaj Esperanto AMO 75

Laure Patas d'Illiers



Kio estas sciencfikcio?

- Ĉiam kaj ĉie
 - Ekzistas de jarcentoj
 - Libroj, bildstrioj, filmoj, videoludoj, televidaj serioj
- Fikcio / nuna realo, prezento de ideoj
- Scienco / fantasto, fabeloj
- Kio okazus se...
 - Alia realo
 - Ebla iugrade, eĉ se ne verŝajne

Kial SF?

- Filozofiaj temoj: homo / roboto, eksterterano, besto, klono
- Politikaj temoj: utopio, feminismo, socia satiro, malutopioj laŭ la tiuepokaj timoj:
 - Invado de eksterteranoj, ribelo de robotoj, vivo post nuklea milito
 - Poluado, vivo post klimata aŭ socia kolapso
- Fascinaj temoj: kosmo, tempovojaĝo, senmortuloj, fino de la mondo

SF kaj EO similas

- Kreita lingvo kaj imagita mondo
 - Lingvaj sciencoj kaj fikcio bazita sur logiko kaj faktoj
- Alia mondo eblas
 - Utopio, espero de pli paca kaj egaleca mondo
- Rilatoj interkulturaj, internaciaj
 - En kiu lingvo komuniki kun malsimilaj estaĵoj?
 - Esperanto kaj babelfiŝo

SF kaj EO

- SF estas grava parto de monda kulturo
 - Gravaj SF verkoj estis tradukitaj en EO
 - Multaj EO verkoj plimalpli apartenas al SF
 - Klare sciencfikciaj verkoj
 - Iom fantastaj
 - Ukronio : kio okazintus se...

Kelkaj verkoj tradukitaj en EO

- Klasikaj aŭtoroj: J. Verne, H.G. Wells, I. Asimov, G. Orwell...
- Frankenŝtejno, M. Shelley
- R.U.R., K. Čapek, 1926
- Vojaĝo al Kazohinio, S. Szathmári, 1958
- Sferoj 1 2 4 5 7 9, 1982-2000
- Solaris, S. Lem, 2021

La Tempo

— Mi amas vin, mi diris al Silĵer, kiu vivis sur la planedo Druĵ. Ĉu vi konsentas edziniĝi kun mi?

Dudek jaroj pasis en mia vivo. Mi eĉ havis tempon por morti. Silĵer turnis sin miadirekten.

— Jes, ŝi tuj respondis sen hezito.

Jacques Sternberg

Kelkaj originalaj verkoj en EO

- Vage tra la dimensioj, G. Konisi, 1976
- La fermita urbo, I. Nemere, 1982
- Sferoj 3 6 8 10
- La lumo nutranta, E. Dudich, 2003
- Beletra almanako 4, 2009
- Libazar' kaj Tero, J. Sigmond k S. Rodin, 2013

Afiŝo

Nokte estis surgluita granda afiŝo sur la muron de la Urbodomo. Neniu sciis, kiu surgluis ĝin tie. La afiŝo kovris la tutan muron. Sur ĝi estis legebla la jena teksto:

ATENTON!

GALAKSIA FUTBAL-ASOCIO

PLENKORE SALUTAS VIN

KAJ ALVOKAS ĈIUN TERANON PARTOPRENI

LA GALAKSIAN FUTBALĈAMPIONECON!

BALDAŬ NI DENOVE ANONCIĜOS.

Apáti Kovács Béla

Kvazaŭ miraĝo

Meze de la sufoko varma vento, kiu tage kaj nokte trablovis tiun inferan regionon, la ekzpedicianoj finfine alvenis antaŭ la magraj ruinoj de pluraj iamaj konstruaĵoj. Tie, kvazaŭ miraĝo, rusta duonfalinta ŝildo ankoraŭ sukcesis anonci per apenaŭ legeblaj literoj: Internacia Polusa Stacio.

Liven Dek